

& La plej mizera en la tuta mondo:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 450 paŝoj dum 5 minutoj. El slovaka tradukis Eduard V. Tvarožek (Slovaka antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per sveda melodio polsa kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<25> (# Tre strömmingar og ena kaku bröd:

/dodo MiFa ReFa MiMi DoMi SoSo; SoSo doTi redo dodo LaFa SoSo;

(# Rekantaĵe: So doTi dore do LaSo La a; Fa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×18)+

(& Strofoj:

'1 /Ja la plej mizera en la tuta mondo ;
estas servutulo en hungara lando,

(×: **Malgranda birdo, flugu vi for ;
libero mankas en la kor'**.)

'2 tage, nokte li nur dronas en laboro, ;
tamen li por ĉiu estas sen honoro.

'3 Pro lia simpleco ĉiuj lin priridas, ; ke
li ilin nutras, ili ja ne vidas.

'4 Reĝ', sinjor', pastraro, metiist',
urbano - ; ĉiuj vivas per la kamparana
pano.

'5 Jen, apenaŭ suno trans la mont'
aperas, ; kvar ĉe lia pordo jam pri li
kverelas.

'6 "Al servut' sinora!" pelas lin l' unua. ;
"Ek al la vilaĝa!" vokas lin la dua,

'7 kaj la tria lin al urba kampo pelas, ;
ĉevalparon l' kvara por jungaĵ' postulas.
.....

'8 Kaj finfine venas la paroĥ-servanto, ;
vokas lin labori sur paroĥa kampo.

'9 En la domo granda mank' de ĉio
estas, ; por l' impost' ŝuldata oni lin
sekvestras.

'10 Sekvestrataj estas brutoj, lita tolo, ;
li sen propra kulpo iĝas almozulo.

'11 Sed li ja oferus ĉion ĉi sen plendo, ;
se nur paco regus en la domo, lando.
.....

'12 Sed subite ar' da rekrutistoj venas, ;
kaj el propra domo li - jen - fuĝi devas.
.....

'13 Se lin oni kaptus kaj farus soldato, ;
oni traktus brute lin kaj sen kompatio.
.....

'14 Tiajn oni batas, gvidas katenitajn ;
en kazernojn aĉajn, forte masonitajn.
.....

'15 Poste oni tondas ilian hararon ; kaj
anstataŭ vesto donas ĉifonaron,

'16 kiun surmetante la junuloj ploras, ;
ke jam tiel estas, aliel ne povas.

'17 Kial vi min naskis, panjo mia kara, ;
por ĉi mond' malbona kaj vivo amara!
.....

'18 Devos mi suferi dum la vivo tuta ;
sub la peza ŝarĝo de la viv' servuta.)